



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu n-ro : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20FF
 Ĝiri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:
 Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROCHE TIMBAUT

la 50-a...

Jubilea dialogo en la Laŭtejo :

- Ĉu jubili pri tiu jubileo ?
- Kial ne ? Multaj E-gazetoj tiel rapide mortas kiel ili naskiĝis, ke efektive nur malmultaj festas sian kvindekan numeron !
- Sed LAŬTE ne pretendas kompari sin al iu ajn "sukcesinta" aŭ "fiaskinta" gazeto. Ĝi ne emas al oficialaĵoj, al grandiozaĵoj, preferante simple esti spegulo de parteto el la eble ne eminenta, sed ja viva E-popoleto.
- Ni ne tro modestu ! Akurata aperado, senĉese kreskanta abonombro, progresiva plibeliĝo de la aspekto kaj transiro de regiona al tutmonda kadro estas relative maloftaj fenomenoj en la E-gazetaro...
- Ĉio estas ja relativa. Tial ni ne fanfaronu pri sukceso, kiun LAŬTE ŝuldas eble ne nur al favoraj cirkonstancoj, sed, ve, ankaŭ al la grizeco de aliaj bultenoj. LAŬTE estu nur ekzemplo - ne modelo - pri tio latente farebla en la E-mondo.
- Nu, ek kun LAŬTE al plua progresado !
- Ĝuste pri tio ni plian fojon atentigu : LAŬTE povos

bone plu "funkcii", nur se ĝi restos akceptema al ĉiu kontribuanto, malmultekosta, kaj materie publikigebla akurate fare de unuopulo. Plua progresado certe ne povos superi 500-ekzempleran eldonkvanton, 300-paĝan jarkolekton, pli ol 6 aŭ 7 numerojn jare. Certe eblus transpasi tiujn limojn, sed nur se la bultenon povus regule prizorgi pluraj surlokaj personoj... aŭ transpreni plimultmembra grupo.

Do, ek, sed singardeme. Ni ne revu !

Kribo

La BROŜURSERVO de S.A.T.

DANKAS AL ĈIES MALAVARO

Malgraŭ la ne tre favora periodo, malgraŭ la ne tre reliefigita alvoko lastpaĝe de la julia n-ro, multaj respondis malavare, malfermante sian monujon por kontribui al la akiro de "JULIA". Ha, ni klarigu : "Julia" estas la baptonomo de la elektronika skribmaŝino "Hermès S 40", kiun ekde nun uzas SAT-Broŝurservo kaj L! La baptopatrino estas kdino D.C., kiu ege kuraĝigis por tiu aŭdaca afero. La mondonacoj atingas jam la 2/3 el la necesa sumo ! Jen la listo, per kiu ni danke kvitancas - kun aparta emocio - al ĉiu kontribuinto. (Pro peto de pluraj ni mencias nur la komencliterojn).

D.C. 1500, P.O. 1000, A.N. 40, L.L. 300, M.T. 200, F.P. 100, P.L. 1000, F.M. 250, G.L. 100, L.P. 15, J.C. 10, N.B. 1000, R.M. 150, J.B. 100, O.M. 150, N.D. 500, A.R. 100, Anonimulo 200, E.G. 100, C.C. 100, H.G. 100, JS.B. 500, H.P. 50, JL.B. 100
Sume, la 20an de aŭgusto 1983, 7665 FF + 1000FF (aldonitaj de la kaso de LAŬTE, kunuzonto de la tajpilo).....8665FF

Pruntedonoj : Anonimulo 800, Abundana Fr.....1100FF
JULIA kostas : 11885,49 + 477,76 (2 kromaj litertiparoj) : 12363,25 FF.


Dankon ankaŭ al tiuj, kiuj mendis kaj plu mendas broŝurojn el la ampleksa stoko kaj al tiuj, kiuj reprovizis sian konton !

La kolektado pludaŭras...

Kribo.

Esperanto estas kiel Orangina : ne konsumu sen agiti !

Jakelino.



kiel aktivi por plu agiti ?

"Kial vi ne estas aktiva esperantistino?" Jen la plej ofta riproĉo, kiun mi aŭdis dum mia tuta esperantista kaj SAT-ana vivo. Tamen, laŭ mi, estus pli inda kaj trafa pripensi la problemon de la agitado - anstataŭ tiun de la aktivecoj...

Unue, aktivi estas ne-transitiva verbo, kies signifo, "esti aktivanta", klare denuncas la aktivulojn pri iu kvazaŭ stabila STATO, kiu manifestiĝas tra rutinaj (?) aktivecoj. En la esperantista rondo, kiu aparte interesas nin, aktivi signifas partopreni, sed, ĉefe, partopreni por tiel provi sian aktivan esperantecon, SAT-anecon, ktp. Alivorte, ĉiu E-o MOVADO kreas ĉe ĉiu esperantisto senton pri sia Esperantomovado, ĉar oni al kutimiĝas al sia propra maniero "aktive" kunlabori kaj kontentiĝas per ĝi. Vidu kiom relativaj estas niaj aktivecoj: ni, ekz., ne perdas la okazon povi diskutadi kaj pripensadi gravajn temojn en L! Sed kiacele ? Ni, laŭŝajne, intencas nur disvolvi nian propran racian penskapablon, fari komparojn kun aliaj vidpunktoj meze, ekz., de la SAT-anara medio. Ni tiele zorgas antaŭ ĉio pri nia persona maturiĝo, perfektigi, kaj arde esperas, ke aliuloj, ĵus enirintaj la "aktivecojn" de Esperantio kaj SAT, ankaŭ ekinteresiĝu tute spontane kaj komencu elprofiti nian jam ekzistantan rondon, por maturigi kaj perfektigi ĝin.

Tre probable vi malmulton scias rilate al la pensmaniero de la Braziloj. Por kiom eble plej resumi, mi diru, ke eĉ ne universitataj

studentoj sukcesas kunmeti frazojn laŭ pli-malpli komprenebla rezonlogiko. "Mi ne pensas, do mi ekzistas" mi aŭdis foje ; kaj plej rimarkinda estas ĉi tiu alia komentario : "SAT estas nedubbele franca", t.e., ke oni tie trovas vortojn kaj ankoraŭ vortojn kaj ĉiam vortojn. Ni vivas ĉi tie meze de festeca etoso - iuj dirus supraĵa, sed mi preferas akcenti nur, ke ĝi estas tute malsimila al tiu de "kulturita" sociordo. TAMEN unu el la nuntempe rekorduzataj vortoj (ĉar oni emas fariĝi pli "politika"), estas AGITI, simple agiti. Transitiva verbo, t.e. rekte interhomrilatema, fore de organizita, pripensita, sistema, individukohera sinteno - ĉar ĝuste tiu tuta fundamenta bazo, el kiu konsistiĝas la "kulturado" (studo kaj instruo), la alkulturiĝo de la homo kiel individuo, aŭ tute ne ekzistas, aŭ montriĝas ege nesufiĉa, malkonsista kompare al la eŭropa. Konsekvence, "tiaj pretendoj (konsciigi/iĝi), diskuti seriozajn problemojn) estas **elita afero**, por **elita minoritato**" (nek la vortoj nek la substrekoj estas miaj ; mi citas ege "aktivan" homon de la Brazila E-movado, kiu, estante esperantisto, jam apartenas vole-nevole al tiu elita aro da esperantistaj "braziliaj simpluloj".

Nu, L! jam pridiskutis kiel vivantigi E-gazeton. Kial ni ne pritraktu kiel vivantigi niajn aktivecojn/emojn **por** plu **agiti**, t.e. establi eksterajn kontaktojn, ĉar, verdire, laŭPIVe, tie centriĝas la sintenoj kaj agoj, kiujn oni fuŝe atribuas al "aktivi". AGITI (tr): 1)Varbi por politika, sociala kaj religia celo incitante la sentojn. 2)Naski en animo sinkvajn sentojn, kiuj ĝin malkvietigas.

Aŭ ĉu ni daŭrigu akvumi nur la grundojn, kie jam ekkreskas la semoj de raciuloj ? Ĉu ni prefere lasu la sentemojn troveblajn universale ĉe ĉiu homo (ja multe pli konkretajn, videblajn, ol la "racia" parto de la homo) al la rektaj manipuladoj fare de malraciaj influoj (i.a. religiaj, naciistaj, ktp) ? Ĉu ni plu movadumu malrekte, kvazaŭ por ni mem, kvazaŭ ne ekzistus, ekz., tiu nekalkulebla amaso da laboristoj, kiuj apartenas al la Tria Mondo ? Ĉar ne temas ĉi tie pri "nivelado", "malaltnivelado" nek "altnivelado" : temas nur pri emo ekagi tie, kie estas(us) bezone, temas "nur" pri ioma ŝanĝo koncerne al la rigardo, kiun oni ŝetas sur la mondon.

Por konkludi, aŭ por komenci : ĉu necesas agiti ? Kiel aktivi tiacele ? Ĉu tiu diskutado plia utilas/is/os/us FAKTE tiusence ? Ĉar, finfine, ĉu ĉio tio estas por vi/ni sensacia novaĵo...?!

Lilia.

Mi multe klopodis por legi la tekston de Lilia. La frazoj estas longaj kaj la ideoj ŝajnas al mi intermiksitaj. Mi do ne estas certa (pro tio mi petas de ŝi egan pardonon), ke mi ĉion komprenis.

La Esperantistoj estas tro rutinaj. Mi tute konsentas kun ŝi. Necesas iom da agitado. Sed tio dependas de la karaktero. Iuj ŝatas regulan aktivadon. Aliaj preferas neregulajn ekagojn. Esperanto bezonas ambaŭ. Tamen estus ne malbone, ke Esperanto paroligu iom pli pri si.

Ĵansebo.

Kiel aktivi por PLI agiti ?

Laŭ la fama psikanalizisto Jung, la homo menso aŭ Memo ampleksas kvar apartajn funkciojn, kiuj devus rajdi duope ; la "taksaj" funkcioj estas la RACIO, kiu juĝas, ĉu afero estas vera aŭ malvera, kaj la KORSENTO, kiu juĝas, "laŭ la koro", ĉu io estas bona aŭ malbona ; la "sentaksaj" funkcioj, akceptantaj senjuĝe, estas la INTUICIO kaj la SENSACIO.

Sed kiam en duopo unu el la funkcioj fariĝas superforta, ĝi ekmal-estimas la parulon kaj devigas ĝin marŝi en la malluma subkonscio anstataŭ rajdi en la lumo de l'konscio ; do, raciema persono ne tro alte taksas la korsenton, la emociojn, ktp, dum povas havi relative potencajn Intuicion aŭ/kaj Sensacion ; kaj same pri la superregado de iu el la aliaj funkcioj.

Ne nur la personoj, sed ankaŭ la popoloj havas, en difinita epoko, difinitan superregantan mens-funkcion : se ni volas, ke nia propagando kaj agitado estu plej efika, ni devus dissendi ĝin per la kvar diversaj "ondo-longoj" de la diversaj mens-funkcioj.

Aplikante tiun regulon al la Esperanto-propagando, ni povas :

1)emfazi la raciecon de la lingo por la raciemuloj ; ĝi estas jam nun pli racia ol la naciaj lingvoj (almenaŭ laŭ mia scio), oni devus nur elimini kelkajn frapantajn mallogikaĵojn, kiuj cetere **ne** estas fundamentaj. Paroli, fine, lingvon racian, estas en si mem granda plezuro por raciemulo.

2)emfazi la Internan Ideon, la pulsantan koron de Esperanto, por la sentemuloj : ĉu Esperanto ne estas rimedo por la interfratiĝo de l'Homaro ? Kien malaperis la pasiaj Esperantistoj de la unua periodo de nia Movado ? Ni ne demandu "**kial**" : ĉar ni bone scias...

3)la intuiciemuloj raviĝas pri la percepto de ia mistika Unueco, kaj eĉ tion oni trovas en Esperanto kaj en la veraj Universalaj religioj: la Zamenhofa Hilelismo, la nunaj Bahaismo kaj Oomoto, konsekvence subtenantaj Esperanton. La **malfanatikaj** religioj ne estas danĝeraj, eĉ!

4)al la sensaciemoj Esperanto povus proponi interesajn vojaĝojn kaj renkontiĝojn, kantojn kaj dancojn internaciajn, amuzajn librojn kaj filmojn kaj bildstriojn en Baza Esperanto, internaciajn restoraciojn, ktp.

** Ne estus danĝere, laŭ mi, propagandi sensacie la "Bazan Esperanton", ĉar oni povus samtempe propagandi, pli serioze, la Mezan Esperanton (kelkfoje iomete pezan) kaj la Muzan aŭ belartan Esperanton (kelkfoje iomete nekompreneblan).

Ni lasu, ke en Esperanton alfluu ĉiakarakteraj personoj, kiuj havas nian saman **celon** : same kiel la potenca Amazonaro de via lando, Lilia, akceptante la akvojn de ĉiaj riveroj, fariĝis la plej granda rivero en la mondo, Esperanto fariĝu la lingvo de ĉiaj homoj.

kontribuo de Ĝiz el Lamark.

*

Ni tute konsentas kun la kvar partoj difinitaj de Kamaradino Ĝiz el Lamark. Oni devas paroli pri la racia lingvo, pri la religia aspekto kaj pri la Interna Ideo, kaj ankaŭ pri la konkretaj aĵoj, kiujn Esperanto donas al ni. Sed, ŝajnas al ni, ke se oni volas, ke la homoj iĝu kaj ĉefe restu Esperantistoj, se oni volas, ke la intereso iĝu vera aliĝo, estas necese privilegii la internan ideon, kiu estas la kerno kaj la koro de Esperanto.

I. Kiel propagandi ?

Estas, por ni, du propagandaj niveloj :

- unue, por interesi homojn al Esperanto : informi ilin, por ke ili ne plu estu kontraŭ la lingvo pro antaŭjuĝoj, por ke, tute simple, ili sciu, ke Esperanto vivas kaj estas vere parolata. Kaj tio estas tre grava nun, ekzemple, se oni volas, ke la gepatroj lasu siajn geknabojn lerni Esperanton (se la leĝpropono...). Tiuj personoj povas subteni Esperanton sen lerni ĝin. La manieroj por atingi ilin estas diversaj : publikaj kunvenoj, afiŝoj, gazetoj, elsendo de radio, kontaktoj kaj kunvenoj kun amikaj organizaĵoj, aŭ sur la laborkampo de ĉiu Esperantisto, ktp...

- due, por venigi novajn gekamaradojn al Esperanto por lerni kaj praktiki ĝin. Por atingi tiun celon, ŝajnas al ni, ke la plej bona maniero estas la rekta propagando, individue, "de la buŝo ĝis la oreloj", inter amikoj, inter kolegoj.

II. Kiel iĝi, esti, kaj resti aktivaj Esperantistoj ?

Por ni, kiuj loĝas en vilaĝoj, ne estas grava problemo varbi novajn komencantojn. Kiel ni diris, dank'al rekta propagando en nia medio ni sukcesis ĉiam trovi novajn gekamaradojn.

Ŝajnas ankaŭ, ke grupo kaj kursoj por komencantoj estas facilaj: la gekursanoj estas interesataj, ĉar la progresoj estas rapidaj. Lerni Esperanton estas preskaŭ ludo (kiam oni komencas).

Sed por ni la problemoj komenciĝas, kiam tiuj gekamaradoj posedas "Bazan Esperanton". Je tiu momento, multaj el ili ne plu daŭrigas la studadon. Kial ?

Eble, ĉar tiu simpla nivelo estas sufiĉa por povi kompreni iomete la aliajn. Eble, ĉar kiam oni atingas tiun nivelon, oni povas vidi, ke Esperanto ne estas tiel simpla kaj tiel facila. Eble, ĉar, ofte, tiuj, kiuj lernas Esperanton havas aliajn agadojn (sociajn, politikajn...). Kaj ĉefe, sendube, ĉar

- ili ne klare vidas la rolon de Esperanto

- krom organizi novajn kursojn, ne estas facile daŭrigi grupon de Esperantistoj. Grupo, sed por kion fari ? Ofte, grupoj de progresantoj iĝas grupoj, en kiuj oni nenion faras, kaj unu post la alia la gekamaradoj foriras.

Kaj jen por ni la ĉefa demando :

Kion oni povas fari **per** Esperanto ?

- Ŝajnas al ni, ke la plej bona maniero por konvinki novajn Esperantistojn, estas iri eksterlanden, por vidi vere, ke Esperanto estas la lingvo de la komunikado, ĉar ĝis tiu momento la rolo de Esperanto restas nur teoria por ili, kaj do, ili ne bezonas ĝin.

- Kaj kiam tiuj Esperantistoj estas praktike konvinkitaj de la Interna Ideo, tiam estas eble organizi grupon de Esperantistoj. Ĉar, je tiu momento, oni bezonas Esperanton. Kaj tiam ne plu estas gravaj problemoj : oni trovas agadojn, oni povas aktivi.

Satana Dinana Grupo.

*

Lilia bone reliefigis la diferencon inter aktivi kaj agiti, pri kiu ĝis nun mi ne tre atentis. Mi opinias, ke la du estas necesaj en la movado. Tamen, agiti estas pli urĝa agado, koncerne la plejmulton da homoj ; sed estas malfacile interesi homon, kiu neniam, eĉ supraĵe, interesiĝis pri la socia afero, je homaraj sentoj, krom se li havas la konvenan terenon, kie kreskos tia semo.

Cetere, multaj el ni provis rilati kun homoj, kiuj kontentiĝas, sin nutrante, laborante kaj sin distrante. Tre ofte, nenian sukceson ni havis ĉe ili. Al tiu "programo" iuj aldonas plian intereson : politikon. Tiam, ofte, ili nenion pli komprenas ol la partiajn dogmojn ; sincere, ili kredas tiamaniere plibonigi la homaron. Do ili estas surdaj al nia homaranismo.



MI LERNOS
ESPERANTON
KIAM
ĈIUJ
PAROLOS
ĜIN!

50%

NE EMAS ESTI
ORIGINALAJ.
ILI LERNOS LA
LINGVON NUR
POR FARI KIEL
LA ALIAJ.



KIAL MI LERNUS
ESPERANTON??
KION MI
POVUS FARI
PER TIU AĴO
???

40%

DE LA POPOLO TUTE
NE KOMPRENAS LA
UTILECON DE LA
INTERNACIA LINGVO,
KAJ LERNOS ĜIN, NUR
SE ONI DEVIĜOS ILIN.



PRI KIO
ESPERANTO
POVAS
UTILI
AL MI
NUN?

9%

SERĈAS TUJAN
PROFITON. ILI
LERNOS LA
LINGVON, KIAM
ĜI ESTOS PROFIT-
DONA.



1%

ESTAS SUFIĈE
IDEALISTAJ
POR EVENTUALE
LERNI ĜIN, SEN
TUJA PROFITO
KAJ KONTRAŬ
LA ĈIRKAŬANTA
OPINIO.

Sur kia kampo agiti? En pacista, ekologia, sindikata, letneja, mondĉivitana kaj similaj medioj. Ja tiuj aktivuloj ne plu estas simplaj homoj. Ili pli facile komprenas nian celon. Jam SAT-Amikaro kaj SAT rilatis (as) kun ili.

Suzanne.

**RESTAS EN LA MONDO
ĈIRKAŬ 39 MILIONOJ DA VARBEBLAJ IDEALISTOJ.
KIAM TIUJ ESTOS VARBITAJ, ESTOS SUFIĈE GRANDA
Merkato por interesi la 360 milionojn da
profitemuloj.
Post tio, la du miliardoj da imitemuloj lernos
aŭtomate la lingvon, same kiel ili lernas nun
la usonan.
Kaj la ceteraj uzos aŭ ne la lingvon, laŭ
siaj emoj.**

Kiel aktivi ? Unue, ĉiam ekzerci kaj bonigi nian lingvokapablon: nenio pli efikas ol ekzemplo de flua parolado.

Plejeble informiĝi pri la malfaciloj kaŭzitaj de lingvaj baroj en la internaciaj rilatoj.

Komparaj studoj inter Esperanto kaj naciaj lingvoj montras, ke ĝi ne fontas el nenio. Mi ja aŭdas de pretendemaj kleruloj : "Esperanto estas artefarita lingvo sen iu fundamento", al kio mi respondas: Kio estas "natura" lingvo, kaj ĉu oni povas fari ion per nenio ? Ĉar multaj kredas, ke la strukturoj de Esperanto estas arbitraj elpensaj de intelektulo. Mi aldonas : Sperto montras, ke ties lernado faciligas tiun de aliaj lingvoj, kaj sekvigas pli bonan scion de la nacia.

Se oni esploras la devenon de niaj naciaj eŭropaj idiomoj, oni vidas, ke ĉiu estas fonetika misformado de komuna radiko nomita hindo-eŭropa.

En "El Popola Ĉinio" n° 6/82, S-ro Jeffrey Sutton el Britio donas kelkajn indikojn pri la maniero argumenti en sia artikolo "Kio estas Esperanto, kaj kia estas ĝia estonteco?"

Maniero montri la ekziston de Esperanto, farebla de ĉiu, estas jena : Se oni devas skribi eksterlanden (al administracio, vojaĝoficejo, ktp...) oni redaktu en Esperanto, indikante en angulo la adreson de la plej proksima delegito. Sur la koverto, antaŭigi la nomojn de urbo kaj lando en nacia idiomo per tiu en E-o.

Ekz.: Londono / Londres

Britio / Grande Bretagne

substrekante la vorton en nacia idiomo, por la leteristo.

Fine, sugesto por rapide konvinki pri la multaspekta utilo de Esperanto : proponi al franco, ke li lernu ekzemple la finnan, kaj al finno la francan. Mi konjektas, ke ĉiu rapide elektos!

Jean-Claude.

*

Kiam oni provas iom propagandi pri Esperanto, la kontraŭargumento kiun oni plej kutime aŭdas, estas jena : Esperanto estas bona afero (la veraj kontraŭstarantoj estas malmultaj), sed ne sufiĉe disvastigita en la mondo ! Se Esperanto estus devige instruata en la lernejoj!... Eĉ en favora medio (mi tion spertis) Esperanto estas konsiderata kiel revo eble realiĝonta, sed en malproksima estonteco.

Kontraŭe al tiu ideo oni devas pruvi, ke Esperanto povas **de nun** havi **praktikan utilecon** por vojaĝi eksterlande, interŝanĝi informojn ideojn, glumarkojn aŭ iujn ajn ŝataĵojn kun aliaj personoj en la tuta mondo (eĉ se ili ne estas multnombraj!). Esperanto ne estas la pana-

cea solvo al la homaj problemoj, kiu malebligas la militon aŭ kreas la universalan fratecon, sed ilo ebliganta rektajn kontaktojn inter personoj, kiuj deziras plivastigi sian horizonton.

Kiel atingi tian celon aŭ almenaŭ proksimiĝi al ĝi ?

Mi opinias, ke la tradiciaj publikaj kunvenoj ne plu taŭgas por la nuna spiritostato. Se ne estas alloga programo kun kantisto, orkestro aŭ aliaj distraĵoj, la "publiko" restas hejme por rigardi la televidon kaj nur kelkaj "puraj" aktivuloj venas. Tial mi trovas tre interesaj la spertojn informi pri Esperanto ĉe la Liberaj Radioj. (Vidu en la lasta Laŭte la agadon en Tarn-departemento). Ankaŭ ekspozicioj eble taŭgas. Oni ne devus atendi, ke la "publiko" venu al ni, sed, male, iri al ĝi per la bildo kaj la sono : modernaj esprimiloj.

J. G.

*

En mi "agiti" havas malbonan resonon, certe ĉar mi fuŝe kaj ne racie atribuas al tiu vorto malĝustajn kaj negativajn ideojn. La letero de Lilia interesas min ne pro la diferenco aŭ la komplementeco inter aktivi kaj agiti, sed pro la ideo, ke Esperantistoj ĝenerale estas "elita minoritato" tro racia kaj intelekta, kiu vole nevole aparte aktivas, ne trafante grandan publikon, forgesante aŭ ignorante la amason da homoj el la "tria mondo" (kiu ankaŭ estas en la riĉaj landoj)... Certe ŝi pravas, racio kaj intelekto estas tro taksataj en Francio kaj ni ne ĉiam konscias pri tio.

Vere la geesperantistoj estas minoritato (mi ne volas aldoni "elita"). Kiel minoritato ili devas samtempe sin protekti, disvolviĝi kaj disvastiĝi por ne malaperi. Ofte mankas fortoj por ĉion fari. La bonvolemo, la aktiveco de multaj esperantistoj, eĉ en ne esperanta medio, ofte ne sufiĉas por "agiti" pro manko de rimedoj, pro izoliteco. Esperanto estas komunikilo : se oni ne havas motivojn por ĝin lerni kaj ĝin uzi, ĝi tute ne utilas, oni ne penas por iĝi esperantisto... Estas pli facile varbi adeptojn por amuziĝi aŭ por profitdonaj celoj...

Jes, grava problemo estas trafi amason da laboristoj, aŭ mi prefere diru : homoj. Kiel fari ? Ĉu agiti la tro pasivajn esperantistojn ? Ĉu agiti la ne-esperantistojn, pruvante la efikon de la Internacia Lingvo ?

Jam J.C. kaj Jean-Claude memorigas kaj precizigas konkretajn kaj bonajn solvojn. Laŭ mi, "ni" esperantistoj devus multigi la internaciajn interŝanĝojn pere de Esperanto pri kiel eble plej diversaj temoj, atesti, ke ni ŝparas monon kaj tempon, uzante Esperanton.

Nicole.

11



VORTOJ DE MALJUNULO

— — —
valo
— — —

TRO MALJUNAĴ

Florako, aŭgusto 1983

Dum tiu ĉi somero, en la mezo de mia 84a jaro, ĉiutage mi naĝas en la malvarmeta rivero ; iafoje mi grimpas ĉe krutaj deklivoj, al montaj rokoj, kiuj jam multajn jardekojn estas de mi konataj. Tie kaj tie ĉi mi renkontas nenium el miaj samaĝuloj. La plimultaj el ili sin opinias tro maljunaj por tiaj korp-ekzercoj. Malprave, mi asertas. Tio estas plezuroj, kiujn ni povas ankoraŭ ĝui, post kiam ni devis rezigni aliajn. La vivo trudas al ni tro da rezignoj, ke ni ne propravole aldonu aliajn. Maljunuloj, miaj kamaradoj, ne rezignu pli frue ol necese !

Ofte mi aŭdas, de nur 50-jaraj personoj, jenan aserton : "Mi volonte lernus Esperanton, sed mi estas tro maljuna." Ankoraŭ unu malĝusta antaŭjuĝo. Sendube, la cerbo malfortiĝas kiel la muskoloj, kaj tiuj personoj bezonus pli da tempo kaj pli da peno ol infanoj kaj junuloj, sed tio tute ne estas super ilia kapablo : tio estas nur afero de volo. Al tiuj timemuloj mi ĉiam respondas per la ekzemplo de tiu 70-jarulo, kiun mi konis antaŭ 60 jaroj, kiam mi estis membro de la Visbadena grupo : tiu maljunulo diligente sekvis la unuagradan kurson gvidatan de mia kara amiko Kurt Schönrich, kaj kontentige progresadis. Imitinde !

SAT-Broŝurservo :

Jam estas komencita la retajpado de "KIEL DIRI...?" fare de Julia, cele al ofsetita reeldono. La nova prezo estos 20 FF. Antaŭmendoj estas bonvenaj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2								■		
3			■							
4				■						
5								■		
6			■		■					
7	■									
8			■							
9										

KRUCVORTOJ

de Th. Falissard.

(Difino kun eliziita vorto indikas solvo-vorton mem eliziitan)

Horizontale : 1. Kun ĝi estas cerbosuferoj kaj ciferoj. 2. Nek tie ĉi nek tie ; en lumo. 3. Marbird' ; fenestrokaŝil' aŭ loĝantokaŝil'? 4. Familiara familian' ; froti per graso. 5. Perdo de la estinteco; kapo de ibiso. 6. Al la amat(in)o anstataŭe de vi ; pronomo ; ridindigu 7. Skue puŝegas. 8. Kapo de iuj kategaj rabobestoj ; vesto aŭ bluzo. 9. Rilatantaj kun antaŭa lando.

Vertikale : 1. Kiel la 1a horizontale! (adverbo). 2. Voki pro danĝero; iru do! 3. Despot' ; nova plant'. 4. Ekster ; rilata kun neellaso, restigo. 5. 'Satir' ; metala. 6. Elirigi (la karan infaneton) ; senvianda ripet! 7. Ĉu varme ĉu malvarme, tiu aĵ sciigos vin senprokraste. 8. Titanio; froti per la grasa fluaĵo. 9. Favora al ekleziularo. 10. Samspecan-ajoj kiel aŭtobusoj.

NASRUDIN

"Nasrudin, mia filo, ellitiĝu frue."

"Kial, Paĉjo?"

"Ĉar tio estas bona kutimo. Iam mi ellitiĝis je l' aŭroro, kaj promenante trovis sakon da oro."

"Sed eble ĝi estis perdita jam la antaŭan vesperon."

"Ne gravas. Kaj cetere mi estus vidinta ĝin la antaŭan vesperon, se ĝi jam kuŝus tie."

"Do ne al ĉiuj estas bone, ellitiĝi frue. La perdinto de la oro ellitiĝis pli frue ol vi."

"La reĝo favoris min", iu rakontis al Nasrudin :
"Mi plantis tritikon kaj venis pluvo. Li aŭdis pri miaj afliktoj kaj kompensis la perdojn kaŭzitajn de l'inundo."

La majstro pensis momenton.

—; "Diru", li demandis, "kiel kaŭzi inundon?"



Ĉies voĉo pri ĉio ajn

PRI VORTINFLACIO

La riĉaĉo de lingvo ne estas la vortoj kompreneblaj de kelkaj personoj, sed la vortoj kompreneblaj kaj uzeblaj de ĉiuj parolantoj. Se tio ne estas la kazo, ne plu temas pri lingvo, sed pri dialekto.

Esperanto ne bezonas dialektojn escepte por komunikado inter fakuloj, kondiĉe ke ili parolu normale al la aliaj.

Ĵansebo.

VORTLIMIGO EN ESPERANTO :

subtena repliko,

de Lorenc' Mi.

Kun plezuro mi legas la pravan aserton de nia kolego, S-ro P. Deker, ke Esperanto kapablas esti la plej riĉa lingvo de la mondo, kaj tiel estos, kiam ĝi estos uzata de ĉiuj tutmonde. Emfazenda en tiu rilato estas la ligita konstato, ke ĝi tamen restos unu lingvo, komprenata trans iuj landlimoj, pro la fakto, ke la asimilado de novaj vortoj devas obei klaran regulon, ke la ortografio de Esperanto estu senescepte aplikata.

La angla lingvo estas sendube jam ege riĉa lingvo, ĉar en ĝi "fremdaj" vortoj estas tre facile asimilataj, ofte senŝanĝe aŭ kun minimuma ŝanĝo. Sed la elparolo de la angla lingvo ege varias, eĉ de regiono al regiono en Britio mem. Rezulto, kiam oni provas uzi la anglan lingvon inter diverslingvanoj ne-britaj, estas manko de la bezonata interkompreno, krom post longa luktado kaj per uzado de nur tre bazaj vortoj el tiu riĉa lingvo. Ne necesas tie ĉi ripeti la ofte faritan aserton, ke la situacio dum Esperanto-kongreso estas nekompareble pli bona.

Lastatempe, studento mia, nederlandano, arkitekto kaj ĉefo de respektata firmao de arkitektoj kaj kiu venas al mi por privataj lecionoj por plibonigi sian kapablon en la angla lingvo, raportis al mi pri komerca kunveno en Amsterdamo, kunveno, kiu preskaŭ fiaskis. La partioj al la kunveno estis : mia studento kun kolego el la sama firmao ; du reprezentantoj de dana entrepreno, entrepreno, kiu poste faros la konstrulaboron kiu estas la temo de la kunveno; kaj unu reprezentanto de la usona kompanio, kiu "mendas" la laboron kaj pagos la fakturojn. Antaŭa interkonsento estas, ke oni uzu la anglan lingvon.

Baldaŭ montriĝis, ke nek la nederlandanoj nek la danoj komprenis la elparolon de la usonano, kaj tiu lasta ne komprenis la aliajn, kvankam inter la danoj kaj la nederlandanoj estadis sufiĉe facila interkomprenado. La kunveno ne sukcesis atingi la deziratajn konkludojn en la daŭro de la posttagmezo antaŭe aranĝita; kaj la usonano kaj la danoj devis ne-intencite resti pluan nokton en Amsterdamo ; eĉ post plua plena tago restis multaj temoj ne findeciditaj, kaj la tri partioj devis interkonsenti, ke la komenco de la laboro estu prokrastata dum pluraj semajnoj, ĝis interkompreno pri pluraj punktoj estus atingita.

La kaŭzo de la preskaŭa fiasko estas, unue, ke la usonano neniam dediĉis tempon al eĉ penso pri lingvo alia ol la gepatra, sed kaj ĉefe, ke la aliaj kvar personoj, kvankam lerninte pli-malpli la saman anglan lingvon dum lernejoj, neniam vere praktikis ĝin krom por mendi taksiveturon, vespermanĝon en restoracio, aŭ tranoktadon en hotelo.

S-ro Deker tute pravas, ke ni devas rigore malpermesi similan okazaĵon, se kaj kiam la komuna lingvo estas Esperanto, (kvankam la ŝancoj, ke la malsukceso estus egale elstara, estas minimumaj!). Mi tenas la opinion, ke krom instruado de la lingvo en la lernejoj, necesas provizi al la geknaboj ŝancojn aktuale uzi la lingvon ankoraŭ dum la lernejoj. Mi proponas, ke post unujara instruado de la lingvo kiel lingvo, la postaj du jaroj entenu instruadon de, ekzemple, geografio, pere de la jam lernita lingvo, kaj kun starigo de ekzamenoj en la temo, sed uzante Esperanton ĉe la fino de la jaro(j). Se la instruist(in)o por geografio povus esti alia persono ol tiu, kiu instruis la bazan

lingvon, des pli bone ; sub taŭgaj kondiĉoj neniel necesus dediĉi plian tempon al instruado de la lingvo kiel lingvo, ĉar asimilado de novaj vortoj flanke de la gelernantoj aŭtomate okazus.

Prave S-ro Deker atentigas nin pri la bezono por pligrandigata libroeldonpovo, aparte pri fakaj libroj mi dubas, ekzemple, ĉu ekzistas jam taŭga lernolibro, per kiu instrui klason en geografio pere de la internacia lingvo. Sed egale grava estas konstati, ke jam ekzistas eldonejoj, kiuj ne plu havas liberan kapitalon, per kiu eldoni pliajn librojn, ĉar la tuta disponebla kapitalo estas jam investita en libroj; kiuj kuŝas sur la bretoj, ĉar Esperantistoj ne sufiĉe ofte elspezas por aĉeti librojn. Tiuj eldonistoj bezonas la subtenon de junaj adeptoj, sed estas facile kompreni la sintenon de ordinara esperantisto, kiu ne pensas pri aĉeto de faka libro por fako, kiu ne interesas ŝilin, aparte se tiu faka libro estis verkita por esti lernolibro en lernejo. (Tiaj libroj ja ekzistas, cetere; mi posedas ege bonan libron pri mondhistorio, eldonitan jam antaŭ la dua mondmilito. Sendube aliaj ekzistas.)

Ligita punkto, eble ne ŝatata inter socialistoj kiel la legantoj de Laŭte! estas, ke la verkantoj/verkantoj de tiaj libroj devas ricevi materian kompenson pro la laboro konsumata en verkado. Alie, ni ne trovos taŭgajn verkantojn!
Rotterdam 1983-07-07.

PRI RASISMO

Ĉu solidareco devigas nin simplaĉigi la problemojn? Ne ekzistas teoriaj enmigrintoj. Estas magrebanoj, nigruloj, azianoj kaj latinamerikanoj. Estas ankaŭ viroj, virinoj, fraŭloj, familianoj, infanoj, plenkreskuloj, gemaljunuloj. Estas ankaŭ malriĉuloj aŭ mezriĉuloj. Ĉiuj estas malsamaj.

Ne ekzistas teoriaj senlaboruloj. Estas profitemaj pigruloj, aŭ mizeraj famiĉestroj, kiuj perdis sian tedan laboraĉon, sed solan vivrimedon.

Ne ekzistas teoriaj virinoj. Estas belaj, junaj kaj dezirindaj virinoj, estas aliaj, pli maljunaj aŭ malbelaj. Estas knabinoj, fraŭlinoj, patrinoj, avinoj.

Ne ekzistas teoria laboro. Estas aĉaj, seninteresaj lacigaj laboroj. Estas ankaŭ pasiigaj respondecaj kreivaj

laboroj. Estas multepagitaj laboroj aŭ bonvolaj senpagaj laboroj.

Ne ekzistas teoriaj domluantoj. La leĝo Quillot en Francio intencis ilin favori. La konsekvenco de tiu pensmaniero estas, ke ĝi estas tre malbona afero por vivaj homoj, kiuj volas lupreni loĝejon. Ĉar ili ne povas trovi loĝejon, se ilia salajro tro malaltas.

Ne ekzistas teoriaj egalaj homoj. Estas vivaj malsamaj homoj, al kiuj ni devas doni la saman rajton al feliĉo.

Ĵansebo.

Pri kontraŭdiroj de nia okcidenta civilizacio

En L! n°49, p.14 VALO skribis :

"...iom post iom ili (la magrebanoj) liberiĝos de la tiraneca korana influo."

kaj du liniojn malsupre :

"...se ni ĉesos kredi, ke nia civilizacio estas la sola..."

Laŭ kio nia tolerema liberalismo estus pli bona ol la tiraneca korano ?

Ĵansebo.

FOR LA FRENEZULON! (3)

Mi gratulas Kdon PMG pro lia demonstrado de la empiriaĵeco de Pi (3,1416). Ja ne estas, laŭ mi, alia procedo por trovi la rilaton inter la cirkonferenco kaj ĝia diametro... krom per la "aritmetika" solvado de la cirklokvadrato, kiun la aludo de Kdo PMG rilate la variadon de la centrangulo tute ne klarigas; ĝi rilatas nur al la cirklo, ne al la kvadrato. Se la solvo estintus tiel simpleca, ĝi ne estus de jarmiloj proverbiĝinta kiel tipo de la nesolveblaj problemoj.

Ĉu Kdo PMG opinias min senpripensema bubo, ke li uzas tiajn supraĵajn argumentojn? Ĉu tutsimple li intencas nur ŝajndiskuti por lacigi min?

Mi ĝin ripetas : la problemo pri la cirklokvadrato konsistas el tio : nur per liniilo kaj cirkliĉo desegni cirklon kaj kvadraton, kies surfacoj samamplaksas.

Nur pri tio temas ĉi tie, kaj al pseŭdoargumentoj mi ne plu respondos.

Sed, ĉar Kdo PMG rebatis min, ke la nombro Pi estas fakto, kiam mi mem jam asertis tion ;

- ĉar li demonstris la empirian procedon trovi ĝin, kiam mi mem jam asertis, ke ĝi originas de empiria

procedo, konsekvence, mi ne dubas, ke li senmanke demonstras en venonta "Laŭte!", kiel facile estas desegni cirklon kaj kvadraton, kies surfacoj samampleksas, kaj nur helpe de liniilo kaj cirkliilo, ĉar mi jam asertis, ke tio eblas.

Mi jam antaŭgratulas lin pro tio.

Aldone mi substrekas, ke mia propra solvado de la cirklokvadrato ŝuldas nenion al la komplika, empiria kaj nur geometria procedo prezentita de S-ro Paul Poisson en sia libro "La Testamento de Noa" (Le Testament de Noé. Eldonejo R.Laffont, Parizo 1972), procedo propra, laŭ li, al la framasonaro kaj al aliaj similaj organizoj. Do, mi ne plagiatas.

Cetere, ĉu iu, individuo aŭ kolektivo, morale rajtus monopoligi la Veron, kaj malhelpi al la aliaj ĝisatingi kaj diskonigi ĝin?

Jese respondi al tiu demando, rekte kaj neeviteble kondukus al tabuigado de la Veron, kaj al dogmigado de ĝia instruado en "apartaj medioj", ankaŭ al blinda fanatikismo.

Al tio precipe spitas la SAT-statuto. Neniam estas senutile rememorigi ĝin.

Anonima B.G.D.) Eymet(

NEPRE ADAPTU LA RELOJN AL NIA VETURILO,

konsilas Lorenco Mi.

Neniel volante plenigi viajn paĝojn per gramatikaj diskutoj, mi tamen devas respondi la artikoleon de P.M.-G. en L! 49, ĉar mi disputas la aserton, ke "laŭ-Fundamente, maŝino estas ilo". Laŭ Plena Vortaro, "maŝino" estas aparato, kiu produktas, transsendas aŭ utiligas forton, kaj anstataŭas aŭ plifaciligas la homan laboron. Por la vorto "ilo" estas tro multaj signifoj por citado tie ĉi, sed tamen inter ili sur paĝo 187 de PV, neniun estas maŝino.

Aliflanke, "komput-" estas verba radiko laŭ Plena Ilustrita Vortaro, (ĝi ne troviĝas en PV), kaj do "komputo" sen plia klarigo ne havas apartan signifon. Tiu mallogikeco de la en-PIV-proponita vorto "komputero" estas deklarita de pluraj fakuloj jam en la daŭro de nur semajnoj post la apero de PIV en 1970, kaj neniun fakulo poste ĝin utiligas. El la verbeco de la radiko, tamen, logike venas pluraj kazoj de la kunmetaĵo "komputilo", kaj kelkaj ricevas mencion en PIV.

Neniu el ili, tamen, ebligas la uzon de "komputilo" por doni la signifon de tiu aparato, kiu povas akcepti kaj plenumi vicon da instrukcioj, inkluzive de instrukcioj kiuj enhavas eblecon direkti la aparaton elekti inter tri aŭ pli da postaj instrukcioj.

Aparta vorto estas bezonata por tia aparato. Kiam S-ro Christian Bertin (mem franco kaj komputila inĝeniero) laboris super traduko de la priskribo de la usondevena aparato "INTEL 8080", li jam en 1978 venis al konstato, ke taŭga formo povus esti "komputatoro" (trovata en PIV kun iom alia senco, sed tamen konata formo por fakaj vortoj), sed li adoptis kaj uzis la formon "komputero". (Referencoj: Scienca Revuo, n-ro 133, 1979.) La vorto "komputero" do estas memstara vorto en nia lingvo; ĝi ne estas kunmetaĵo, kiel volas kredigi nin S-ro P.M.-G.

Kiel memstara vorto, "komputero" aliĝas al longa vico de vortoj, kiuj nur ŝajne estas analizeblaj. Mi pensas pri: alig-at-oro; krokod-ilo; elef-anto; kraj-ono; lab-oro, kaj tiel plu. Tamen, "komputero" ja estas en aparta kategorio pro la apudeco de la verba radiko, sed eĉ tiam ĝi ne estas unika, ĉar en tiu kategorio troviĝas akumulato, generato kaj kelkaj aliaj.

En la sama artikolo de P.M.-G. troviĝas aliaj asertoj, kiuj meritas respondon.

Pri la aserto, ke "ne ĉiuj komputeroj komprenas la anglan lingvon", mi urĝe petas pruvon per listigo de faktoj. Mi mem povas nur diri, ke nenie en Nederlando troviĝas tia aparato, kiu senpere komprenas la nederlandan lingvon; pluraj miaj informpetoj al pluraj fabrikantoj de maŝinoj neniam ricevas kontentigan respondon, kiam la informpeto rilatas al lingvo alia ol la angla. La plej ofta respondo estas tuta silento. Mi jam asertis, ke ekzistas tradukprogramoj, kiuj ebligas la uzadon, sub taŭgaj kondiĉoj, de lingvo alia ol la angla, sed tio estas tute alia afero ol aserti, ke la maŝino komprenas la francan aŭ iun alian lingvon (krom la anglan). La konata entrepreno Philips, en Eindhoven, Nederlando, produktas kaj vendadas komputerojn por uzado de kiuj en la nederlanda lingvo, tamen, oni devas uzi tradukprogramon.

Via kontribuinto, P.M.-G., verŝajne tute pretas akcepti la ideon, ke Esperantisto en Fiĝilando, kiu volas uzi komputeron por fari la kontotenadon por

sia loka E-grupo, devas unue lerni la anglan lingvon ĝis iu grado, por interrilati kun la aparato. En tio almenaŭ mi forte malsubtenas lin. Aŭ ĉu mi miskomprenis liajn vortojn ? (Kaj anstataŭ Fiĝilando, penso pri Mozambiko, Angolo, Honduraso aŭ iu alia lando, en kiuj la angla lingvo ne estas eĉ la dua lingvo por la indiĝenoj).

Ni devas konstati diferencon en la situacio rilate al komputoroj, kiam ni pensas pri Esperanto, kiel prave atentigas nin nia estimata kolego. Kvankam ne multe gravas, ke komputoroj malagnoskas la kromajn kvin literojn de la nederlanda lingvo, aŭ la kromajn sep (?) de la franca lingvo, (pro la fakto, ke la rezulto estas tamen legebla), utiligo de nur parto de la alfabeto en la internacia lingvo povas doni rezulton erarigan aŭ almenaŭ tre malfacile legeblan.

Sed ni ne ignoru la fakton (facile proveblan, cetere; vidu mian artikolon en MONATO, 5/83), ke komputoro en si mem ne havas lingvon; ĝi havas operacikodojn rekonatajn per ciferoj en la ok-bita binara kodo. Estus tute facila afero doni al apartaj ok-bitoj signifojn, kiuj agnoskas la plenan alfabeton de la internacia lingvo, kaj estas afero de nur historio kaj hazardaj cirkonstancoj, ke oni efektive "tradukis" tiujn ok-bitojn en la anglan lingvon. (Vidu la artikolon en Laŭte!, en kiu mi priskribas la tutan historion de la evoluo de la aparato, kiun ni nun nomas komputoro.)

La ĉefa demando ne estas, ĉu ni lernu Esperanton per uzado de komputoro (kiu ŝajne estas grava afero por nia estimata kolego), sed ĉu ni povas esperi uzi sklavajn komputorojn en la servo de Esperanto kaj la mondo. Ligita demando estas, ĉu ni ankoraŭ pretendas, ke ni, pere de Esperanto, havas la solvon por la problemoj de miskomprenoj pro la multlingveco de la homoj en la mondo ? Spite de la fakto, ke mi estas denaske anglaparolanto, mi ne havas ian eĉ plej malgrandan dubon, ke la respondo al tiu lasta demando estas pozitiva.

Se nia estimata kolego vere volas, ke la malamiko de nia solvo regu la mondon, profitante el tiuj miskomprenoj, kaj malebligante la ceterajn homojn ĝui la avantaĝojn rekoneblajn per aplikado de komputoroj al la apartaj lokaj problemoj, tiam li pli klare deklaru tiun lian sintenon. Dume, ni ne pensu pri re-iro al

la desegnotablo por re-elpensi internacian lingvon; ni re-faru la relojn, por ke ili portu la belan lingvon, kiun ni jam havas!

Mi uzas la artifikon de postskribo por peti respondojn de iuj legantoj, kiuj subtenas mian starpunkton. Post la verkado de mia unua artikolo pri la ideo de Esperanto-komputoro, mi pli profunde studis la bezonojn kaj eblecojn, ĝis nun kun kompleta sukceso. Jam en malneta formo estas la baza programadlingvo por populara mikrokomputoro, sed rapide nun alvenas la tago en kiu, por fari la postan paŝon, mi devos meti konsiderindan sumon de mono je risko de malsukceso. Estus tre agrable konstati, ke mi havas subtenantojn preter la limoj de propra familio.

Kiel postpostskribon, mi deklaru, ke mi subtenas la proponitan solvon de Paŭlo, kondiĉe ke ni konstatu, ke ĝi estas provizora solvo. Ŝajnas al mi, ke tiu uzado de ikso dum enmetado de la donumaĵoj havas avantaĝojn, se ni supozas, ke per la programo ni povas devigi la aparaton, je elpreso, doni la ĝustajn literojn de la Esperanto-alfabeto. Aliflanke, la propono uzi "w" anstataŭ "ŭ" ne estas solvo, ĉar tio aliĝustigus la alfabetan vicordon ; oni tiam havus la serion : ...t u v ŝ z anstataŭ la serio ... t u ŭ v z. Ĝi do ne estas eĉ provizora solvo.

Rotterdam, 1983-07-06.

*

Pri Internacia Komputera Alfabeto (INKAL)

He jes! Babelismo ekzistas ankaŭ ĉe la komputeroj! La usonaj uzas kromsignojn kiel @, \$, #, la francaj é, è, ù, ç, §. Kial ne esperantaj komputeroj kun ĉapelitaj literoj ? Estas la plej racia solvo por trakti tekstojn en Esperanto.

Sed por informpritraktado de internaciaj nomoj, mi proponas alian solvon : Projekton de Internacia Komputera Alfabeto (INKAL).

Temas pri ioma ŝanĝo en la ISO (Internacia Normo) alfabeto :

' A B C D E F G	En tiu alfabeto estas 4 akcentoj,
H I J K L M N O	apudmeteblaj (en komputeroj,
P Q R S T U V W	sed oni povas aliloke surmeti
X Y Z ^ ˇ ˘ ˙ ˚	ilin). Tiuj 4 akcentoj, kombinitaj
! [] X ˆ ˘ ˙ ˚	kun 26 literoj, donas al ni 130-
() * + , - . /	literan alfabeton :
0 1 2 3 4 5 6 7	a, a [˘] , a [˙] , a [˚] , a [˛] , b, b [˘] , b [˙]
8 9 : ; < = > ?	b [˚] ,...

Estas multaj avantaĝoj :

- 1) Ne plu estas problemo pro la ĉapelitaj literoj.
- 2) Oni povas transskribi proprajn nomojn senerare.
ekz. ĉ skribiĝos c[˘]
ä " a[˛]

Same pri la nelatinaj alfabetoj. Ĉiu lando proponu sian transskribmanieron.

- 3) Oni povas transskribi la plejparton de la fonemoj, dank'al 130-litera alfabeto.

ekz. por la franca: a[˘] = an, o[˘] = on, o[˙] = eu, u[˙] = u,
u = ou.

Por la angla : t[˘] = th... ktp.

Ankaŭ tie ĉiu lando proponu, sed la Esperantistoj decidu. (Du lingvoj povas havi samajn neesperantajn fonemojn).

- 4) Dank'al aliaj signoj, la programlingvoj disponos pri pli taŭgaj signoj :

x (multobligo)	apud *	(potenco)
÷ (divido)	apud /	
≡ (ekvaloras)	apud =	(egalas)
[] (indekso)	apud ()	(parentezoj)

Ankaŭ la akcentoj havas komputeran sencon :

˘	(logika "ne")
˙	(logika "aŭ")
˚	(logika "kaj")
˛	(iĝis)

Kompreneble oni rajtas surmeti la akcentojn aŭ aldoni majusklojn. Sed estas nur estetika afero, farenda de specialaj printmaŝinoj. Tio ne estas utila por komunikado.

Mi ŝatus ricevi opiniojn pri tiu afero. Precipe tiujn de nefrancaj legantoj kaj de fakuloj pri komputeroj, lingvistiko aŭ fonetiko.

PRI ERAREMECO

Denove "P.M.-G." eraras! Kompatindulo!

Nu, kompreneble, "Laŭte!" estas unika revuo, sed tiu unikeco ne venas el preteco akcepti lingvajn eksperimentojn. Revuo MONATO (kiu, cetere, estas leginda pro aliaj valoraj ecoj, tute kiel "Laŭte!" estas ege leginda pro pluraj valoraj ecoj), ne nur akceptas sed ankaŭ invitas lingvajn eksperimentojn. Pli-malpli regule aperas rubriko kun la titolo "Leksikono", en kiu invititoj klarigas la uzadon de ne-kutimaj esprimoj kaj parolturnoj, kaj krome estas tute kutima afero trovi piednotojn por klarigi vortojn uzatajn en artikoloj. Kompreneble oni strebas ne enkonduki novan vorton por esprimi ideon, por kiu jam ekzistas vorto aŭ esprimo ; la iniciatinto mem de la lingvo donis ĉiam-validan konsilon pri tio.

LM

PRI VAZEKTOMIO*

Antaŭ la 1a de julio mi ankoraŭ estis laboranta - kvankam mi ne estis laboremuĵo . Sed de tiam mi estas prepensiulo, kaj nun mi havas sufiĉe da tempo por legi miajn malnovajn ekzemplerojn de L!. Do mi pardonpetas, ke mi nur hodiaŭ sendas al vi informon pri **vazektomio**, pri kiu Kribo parolis, respondante al artikolo de G. MARCHIONI pri virina steriligado en n° 46 de Jan/Feb.1983.

De longa tempo mi aktivis en Franca Familia Planado kaj mi multe interesiĝis pri la temo steriligado de virinoj - tiu estis tiama modo - kaj de viroj. Sed pri ĉi-lasto oni ne multe parolis. Kelkaj kuracistoj, laborantaj por ni, diris foje al mi, ke tia operacio estas tre simpla kaj facila, sen malagrabla sekvo (la vireco estas tute konservata). Sed neniam iu el tiuj kuracistoj diris al mi : "Mi provis sur mi mem kaj mi povas garantii la rezulton", aŭ eĉ : "Mi faris tian operacion sur tiu operaciito, al kiu vi povas peti informojn pri la rezulto."

Kaj kiam ni iĝis duafoje gepatroj, kun mia edzino ni unue decidis uzi pilolon. Mi ja diras ni, ĉar nur mi pensis regule dum kvin kompletaj jaroj preni la pilolon. Kiam mi ne estis hejme, mia edzino tre ofte

* Vd. PIV (Vazo.2).

forgesis kaj havis preskaŭ ĉiujfoje sian menstruon, kiam mi revenis. Tamen, ankaŭ ŝi estas aktivulo de Franca Familia Planado. Sed tio estis unu el ŝiaj blokiloj. Do, post kvin jaroj, malgraŭ la skribaĵo sur ĉiuj speguloj en nia domo "Ne forgesu vian pilolon", ni pensis, ke du infanoj sufiĉas por nia familio kaj mia edzino pensis, ke ŝi devas steriligi. Interterpe mi multe legis pri vazektomio kaj la informoj ŝajnis tute favoraj kaj post diskutadoj ni decidis la operacion por mi.

Kun la informoj, kiujn ni povis havi nome de F.F.P., mi konsultis kuraciston, kiu estis rekomendita. Tiu kirurgo aŭdis, ke mi bone konas la problemon, konstatas laŭ mia diro, ke mi havas globetojn sur miaj vazoj kaj do li devos tranĉi. Ĉar se tiuj globetoj estas krabaj, oni devas apartigi testikojn kaj prostaton ; se unu estas vundita oni devas protekti la aliajn. Li preparis la necesajn paperojn por Socia Asekuro kaj mia Interpa Kaso. Post unu semajno mi eniris la klinikon kun la pagkonsento. Do mi ne devis pagi por la operacio. Mi eniris vespere sen manĝi, kaj la sekvantan matenon mi estis sur operacitablo. Mi petis la kuraciston konservi la du vaz-pecetojn, kiujn li tranĉos, kaj mi estis endormigita. Post kvaronhoro, aŭ eble pli, mi vekigis en la dormĉambro kun mia edzino, kiu vizitis min. Mi vidis la du pecetojn, kiujn mi volis en plastaĵon meti. Malgraŭ pluraj provoj mi neniam sukcesis. Kaj post tagmanĝo mi foriris. La kuracisto rekomendis ne havi sekskunigojn (li estas kirurgo kaj tio ne estas lia problemoj). Do ne forgesu, ke la sperma veziketo ankoraŭ entenas sperman provizon por dudek fojoj. Mi ne povis atendi la semajnfinojn kaj tuj vespere mi provis : la rezulto estis tre bona, kaj tiam mi povis kun peno atendi kelkajn tagojn. Post la semajno vi devos reiri al la kirurgo, por ke li forigu la du hoketojn, kaj ĉio estos finita.

Sed tiu afero necesigas bonan psikologian preparadon. Se mi rakontis la aferon, eble kun tro multaj detaloj, tio estis por montri, ke teknike ĝi estas tre simpla. Sed la viro estas, oni povas diri ĝin, malforta sekso. Se li ne estas bone, eĉ tre bone informita, lia operacio riskas perdi al li la virecon. Certe oni ne ĉiam pensas

pri tio, kiam oni faras ĝin al virino. De jaroj oni faris tiel kaj la virinoj devas nur disstarigi siajn krur-ojn! Sed la kuracisto havas ĉiam pli gravajn problemojn! Nun mi estas vazektomiita de antaŭ pli ol naŭ jaroj kaj mi opinias, ke tio estis tre bona elekto por nia paro. Mi konsilas al la viroj, kiuj vizitas FFP-on kaj informas lin : se iu el vi estas interesata, vizitu FFP-o plej proksiman de via urbo aŭ skribu al mi. Mi provos helpi vin. Aŭ se multaj petos precizigojn, mi povos respondi per "Laŭte!".

Paŭlo.

Por ĉiuaĝaj infanoj :

LA TUMULTEMA NUBETO

Estis iam tumultema nubeto, kiu ĉiumomente malobeis al siaj gepatroj.

Li ne volis, same kiel la aliaj nuboj, fari pluvon kaj belan veteron. Bluan ĉielon li serĉis, kaj ĉefe la sunon. Sed la gepatroj de ŝatis la sunon.

La nubeto ekploris, tuj kiam li vidis pluvon. Tial la vento, kiu kompatis lian malĝojon, lin transportis tutblove al lazurĉielaj landoj, kie varmas kaj kie agrablas vivi. Tie li fine retrovis sian amikon, la sunon. La nubeto tiam estis kontenta kaj feliĉa promeni en sia blua ĉielangulo.

Unu tagon, kiam tute sola li promenis en la ĉielo, varmis, tre varmis, varmis eĉ tro. Subite, en la lontano li perceptis proksimiĝantan bruon, ne plu estis la suno, la ĉielo tenebrigis kaj fariĝis nigra kiel plumbo.

Li aŭdis fortan tondron, similan al ĉifata metalo, kaj el la tenebroj subite ŝprucis fajra lumo, fulmoj ŝiris la ĉielon. La nubeto ektimis tiun mallumon kaj tian bruegon. Li estis sola, konsternita, fore de la familio. Timo lin kaptis kaj li ekploris.

Multe, longe, daŭre li ploris. Ĉiuj larmoj de lia korpo elfluis.

Tiel ke neniam oni retrovis nian nubeton.

J.P. Hennebois.

LA TRIA FRANC-GERMANA JUNULARA SEMINARIO okazis en ĉarma vilaĝo de Bavario, ALTUSRIED. Trideko da personoj, el diversaj eŭropaj landoj (ĉefe Germanio kaj Francio, sed ankaŭ Italio, Nederlando kaj Pollando) kunvenis dum unu semajno (15/22 julio). La ĝenerala temo-celo de tiu seminario estis tute eksploda: "La radikalaj revoj en nia burĝa ĉiutago". Do mi ekkuris ĝis tiu agrabla loko, preparinte antaŭe prelegojn pri la "senaŭtoritata edukado en Francio" kaj pri la "domokupacioj en la francaj urboj" (vidu poste). La aliaj prelegoj temis pri diversaj problemoj : "la rolo de tekniko", "kristanismo, taoismo kaj meditado", "alternativa vivo per konscia vivmaniero".

Ni provis eskapi nian burĝan ĉiutagon dum tiu anima semajno !

"DOMOKUPACIOJ" en la francaj urboj kiel radikala sperto.

1. Evoluado kaj nuntempa situacio de la ideoj pri memregado

De longe, la memregadaj spertoj ekzistis. Multe da anarkiistoj, socialistoj kaj katolikoj provis starigi, ĉefe inter la du Mondmilitoj, entreprenojn nomitajn "komunumaj", en kiuj laboro kaj vivo estas kolektivaj.

Tiam ekzistis forta kredo : sen profitoj, la komunumaj entreprenoj povas praktiki malaltajn prezojn kaj finfine faligi la kapitalismon per konkurenco. Tamen, multe da entreprenoj integriĝis en la kapitalisman sistemon laŭ la komerca vidpunkto ; sed interne ili daŭre funkciis sur demokratiaj bazoj. Klare ilustras tion la evoluado de fabriko LIP (por brakhorloĝoj) en Besançon, kiu estis, en la jaroj '70, la ĉefa modelo pri la memadministrataj spertoj por la maldekstraj partioj. Hodiaŭ, la "nova kooperativo de la eks-laboristoj de LIP" (ĝia titolo) volas produkti profitojn kaj agnoski la regulojn de la liberala ekonomio. Pro profitavido estiĝas spiritostatoj tre foraj de la memadministrata etiko.

Je la jaro 1983 ekzistas kelkaj aktualaj ekzemploj :

- la ĵurnalo de la nordfranca urbo Auxerre "Yonne républicaine" funkcias memadministre ; tamen ĝi propagandas dekstrajn ideojn.
- en "Manuest" - entrepreno pri mebloj en departemento Vosges kun 2600 laboristoj - ne ekzistas ŝanĝo en la salajra hierarkio, la sama kiel dum la estra periodo.

*

Malgraŭ tiuj problemoj, la koncepto "memregado" disvastiĝas kaj evoluas.

Se ekde majo 1968 la slogano "Memregado" aŭ "Memadministrato" aperas ofte en la sindikataj luktoj, tiu fenomeno reale naskiĝas,

kiam la laboristoj bezonas defendi siajn oficojn. Fakte ĝi koncernas la bankrotajn entreprenojn, en kiuj la mastro iĝis nekapabla estri kaj senkompetenta. La laboristoj tiam komprenas la neutilecon de la mastro ; aŭ, dua situacio pli ofta, la laboristoj provas ekonomie vivtenigi sian entreprenon.

Tial, la laboristoj serĉas ĉefe mastron : ili estas ĝenerale tre konformemaj. Eĉ kiam ekzistas rekta administrado kaj socia posedo de la produkto-rimedoj, ili rifuzas ĉiam la vorton **"Memadministrato"**.

Tamen, dum la jaroj 70, aperis nova movado pri memadministrado, tute diferenca, tiu movado estas malpli politika, kvankam ĝi uzas la ideojn de majo 1968. Ĝi estas speco de movado alternativa : kiu proponas "kontraŭsocion", sen tamen deziri fari ĝeneralan revolucion. Socie, ĝi koncernas la junularajn mediojn kaj ne la laboristajn.

Jen kelkaj konceptoj por difini ĝin :

- rifuzo al la intensa produktado : labori malpli por pli bone vivi.
- ĉefe starigi loka ekonomian reton paralele al la kapitalismo kaj ne fronte al kapitalismo.
- disvastiĝo de la solidareco, ĉefe kun la Tria Mondo.

Theo Pinkus, devianto de la Svisa Labor-Partio (komunista) opinias, ke tiu agado estas la "sola revoluciema strategio" en landoj, kiel Svisio verŝajne, kie la laborista klaso ne plu ekzistas reale nek ideologie (la nuntempaj sklavojoj estas la gastlaboristoj).

En Francio, tiu "Alternativo"-movado estas, laŭ mi, pli teoria ol reala. Mi ne scias ekzakte kial. Tamen, kiam mi ĉeestis en Germanio dum la pasinta somero 1982, mi konstatis, ke la memadministrataj praktikoj ekzistas kaj bone funkcias. En Francio, la sociaj luktoj malofte daŭras. Mi citu la ekzemplojn de la ekologia movado : en CREYS-MALVILLE, PLOGOFF, GOLFECH, multe da personoj agemaj kontraŭ la atomcentraloj... sed poste neniu. Ne ekzistas strukturita politika movado nek realaj spertoj.

Tamen, post majo 1968, ek-estis reala ondo de komunumoj en kamparo, kiuj tre rapide falis kaj malaperis. La partoprenantoj volis nur fuĝi el la urba kaj kapitalisma mondo : nur teoria estis tiu reveno ĝis la Naturo ; kaj la ekonomia vivo ne havis por ili gravecon.

La nunaj restantaj komunumoj ŝanĝiĝis profunde, ĉar ne plu estas komunumeca utopio. Jen estas la reveno al la socia strukturo tradicia (familio / geedzoj), petoj por ŝtataj subvencioj, laboro por ekonomia monhavigo. Tial, en tiu movado, la politika dimensio por ĝeneraligo

malaperis kaj la mastra sistemo regajnas la spertojn.

Tamen, la alia elekto - la komunuma utopio - kondukas rekte al malsukceso. La marĝena vivo vole-nevole deziras interŝanĝojn kun la kapitalisma sistemo kaj evidente postulas multe da kompromisoj. Se oni ne konsentas pri tio, oni finatingas materialan mizeron kaj tre rapide daŭran psikoz-dramon koncerne la homajn rilatojn (mi pensas pri la korinklinaj rilatoj).

2. Domokupacioj en francaj urboj.

Nuntempe, kie okazas do la spertoj por memregado ? Laŭ mi, ili estas la "squatts" aŭ "domokupadoj en urboj". Per sia agado ili apartenas al tiu nova movado, kiun mi difinis antaŭe. Fakte tiuj okupadoj estas ne nur politikaj ; ili proponas **viv-alternativon** kun ekonomiaj reguloj tute diferencaj al la kapitalismaj reguloj. Okupadi kolektive estas signifoplene : la partoprenantoj volas transformi la loĝejojn por ŝanĝi sian vivon.

"Squatt" estas "etrevolucioj" : nova koncepto kreita de la sociologoj. La personoj politike aktivaj volas ŝanĝi nur sian vivon kaj ne plu ŝanĝi la tutan mondon.

Jen kelkajn demandojn mi povas fari por klarigi tiun movadon **squatt**. Poste mi studos la francan situacion...

- Kial ni povas kvalifiki politike "squatt" kiel "kontraŭ-aŭtoritata" agadon ? Plej ofte, la decidoj intervenas tie, baze kaj kolektive ; kaj pli ĝenerale, la "squatt" malakceptas la ŝtat-asistadon favore al la individuo kaj ties interesoj, eĉ foje ĝi petas monhelpon de la ŝtato aŭ de la urbestro. Tamen, la kontraŭ-ŝtatismo ne ĉiam estas ideologia, ĝi estas konkreta kaj reala. Efektive, la individuo tro longe atendas la loĝejon deziratan pro loĝkrizo. Fine, li seniluziĝas kaj li agadas mem.

- Kial la "squatt"-movado estas radikala ? Laŭ mi, la vivo en squatt neprigas novan konduton. Kolektiva loĝado ebligas la disvastigon de multaj agadoj : starigo de diversaj laborejoj, socia kafejo, redaktado de revuoj.. la loĝejo ne plu limigas kaj fermas la spacon, ankaŭ ne plu apartigas la funkciojn. La squatt rifuzas la izoladon. Tiu loĝmaniero konsistigas taŭĝan rimedon por komuniki, ankaŭ por konstrue kontesti. Sed male al la utopiaj komunumoj, la ekonomiaj problemoj havas gravecon.

(daŭrigota en venonta L.)

Michel BAURET.

laŭtaj informoj kaj petoj

S.A.T. kongresis en LINZ

De la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto S.A.T. okazigis sian 56-an Kongreson en la aŭstria urbo Linz ; la 185 ĉeestantoj el 17 landoj pritraktis aktualajn temojn, ne nur organizajn, en kvar laborkunsidoj. Du prelegoj vekis la intereson de la anaro. Duontaga ekskurso, vizito al uzinoj kaj tuttaga ekskurso al Bad Ischl estis distraj kaj instruaj. En du vesperoj ni konatiĝis kun la aŭstra folkloro per artaj prezentadoj. En pluraj frakci-kunvenoj disvolviĝis debatoj pri ekzemple pacismo, liberpensado kaj liberecanaj ideoj. Krom Gvid-rezolucio koncernanta agadon kaj vivon de la Asocio estis akceptita la sekvanta

DEKLARACIO

La Kongreso

alvokas por vigla kontraŭstaro al vetarmado, kiu proksimigas la homaron al ekstermo ;

protestas kontraŭ ĉia militista propagando en edukadsfero, en kiu aĵn lando, kaj kontraŭ la persekutado de militrifuzantoj kaj pacagantoj ; **subtenas** la konĉiencobjektantojn ;

konstatas, ke unu el la ĉefaj faktoroj endanĝerigantaj la mondpacon estas insida ŝtata manipulado de la mensoj en informado kaj komunikado ;

akcentas la gravecon de interhoma komunikado kaj subtenas la ideon pri liberaj sendependaj radiostacioj, kiel oficiale en Francio, kaj esperas tre provizora la malpermeson, kiu trafas "Radio Libertaire" en Parizo ;

opinias, ke la avangardaj teknikoj de komunikado absolute ne sufiĉas sen la uzado de komuna sennacieca lingvo ;

esprimas sian aprobon al la sindikataj kaj laboristaj gazetoj, kiuj, kiel "Radniĉke novine" (organo de la kroataj sindikatoj), en plena akordo kun la celoj de la Monda Jaro pri Komunikado, malfermis regulan Esperanto-rubrikon ;

salutas la enviciĝon de Ĉinio inter la landoj kiuj, per decido de la ministerio de edukado, enkondukis Esperanton en la superan instruadon, kreas la bazon de sendiskriminacia komunikado kaj de nova monda lingva ordo.

Ĉu vi konas la ĉarman urbeton LA HAG' ?*

En ĝi estas la sola uzino por la traktado de la atomaj rubaĵoj en la mondo kaj ĝi situas en Normandio (norde de Francio). Fakte, ekzistas ankaŭ du aliaj tiaj uzinoj, sed nur ĉi tiu "funkcias" malgraŭ tre malalta rendimento kaj sufiĉe oftaj okazaĵoj : Ŭindskel (angl. Windscale) ne estas uzata pro oftaj incidentoj kaj la japana ankoraŭ estas nur eksperimenta.

Jam de 12 jaroj, K.K.A.P.H. (komitato kontraŭ la atoma polucio en La Hag) francl. C.C.P.A.H., informas la lokan kaj mondan popolon pri la danĝeroj kaj luktas ĉefe cele al la fermigo de tiu plutonio-provizilo. Ĉiu scias, ke plutonio estas uzata ĉefe por la fabrikado de atombomboj.

Nu, okazis kunigo proksime de Ŝerbur (francl. Cherbourg) por protesti kontraŭ tiusensencaĵo (kompreneble, la militistaro ne same opinias!). Tamen, anstataŭ la pluraj miloj antaŭviditaj, nur 900/1000 personoj ĉeestis (pro ferio, laciĝo, ktp...) kvankam la lokanoj estas ege favoraj al la agoj de K.K.A.P.H.

Rezulto : tre granda deficitio.

Jen do alvoko al ĉiuj : Helpu la aktivulojn de K.K.A.P.H. per mondonaco, por ke ili daŭrigu la lukton kontraŭ tiu unika monstraĵo.

For atomenergio, nerendimenta kaj danĝera, vivu K.K.A.P.H.

* (francl. La Hague)

C.C.P.A.H., B.P. 156

F 55104 CHERBOURG

Vivo de la Girondia grupo

La venonta kunveno de la Girondia grupo de laboristaj geesperantistoj okazos en la Kulturcentro de EYSINES, je la 14a30, la 17an de Septembro.

Asocio "Esperanto Pau-Adour"

La Klubo akceptos gehispanojn la 23.24.25ajn de septembro.

Okaze de la oficiala inaŭgurado de "Square Zamenhof" en PAU, la 24an de septembro, oni fiksis tie bronzan medalegon (diametro 40 cm), kiu montros la kapon de la juna doktoro, iniciatinto de nia lingvo.

En St Jean-de-Luz, fine de junio, okazis E-semajnfino (renkontiĝo + lernado). Partoprenis 20 personoj, dek venis el Hispanio.

AMFP (Medicina, franc-palestina asocio) aperigis diskon pri palestinaj poemoj. Mohamed Bhar, tunizia kantisto komponis la muzikon. La akvareloj ilustrantaj la diskokoverton estas pentritaj de la palestina artisto Samir Salameh. Ekkonu la palestinan kulturon, ĝi ne trompos vin! Tiu disko estas mendebla al AMFP, 14 rue de Nanteuil, 75015 PARIS. Kosto 50 F, franko: + 15 F.

Aperis la somera n-ro 22/23 de "Solidarité Palestine". La gazeto entenas multajn interesajn artikolojn, ĉefe interparoladon kun Ilan Halevi, respondeculo pri la rilatoj de la Socialista Internacio, post la murdo de Issam Sartouai.

Ginette.

Al ne konformismemaj francoj mi rekomendas la (franclingvan) libron de kuracisto : Docteur JACQUES, **Vos Chaines**.

Tiu kuracisto - kiu prave fieras pri sia titolo "kampara kuracisto" plej sincere priskribas sian profesion kaj personan vivon, la abortojn (li aŭdacis helpi al virinoj eĉ antaŭ la oficialigo de la priaborta leĝo en Francio), la eksedziĝojn kaj nian sintenon, tiel seksan kiel pli ĝeneralan. Kompreneble, iuj kazoj kaj detaloj povas aspekti "ŝokaj". Kompreneble, la aŭtoro montras la moralajn, medicinajn, jurajn, leĝajn mankojn kaj strangaĵojn de nia Socio, kiu konsistas el granda nombro da Tartufoj. Mi aldonu, ke tiu nekonformismemulo estas de ĉiam simpatianto de Esperanto, kiun li plurfoje mencias en sia libro.

Oni povas mendi la libron rekte al Cercle amical espérantiste de l'Agenais, 47340 LAROQUE TIMBAUT (la aŭtoro estas samvilaĝano). Prezo kun inkluzivita afranko : 70 FF.

Se al vi ne plaĉos la libro, revendu ĝin al amik(in)o !

Kribo.

ICEM-Esperanto

En Buxy (Burgonja regiono) de la 25a de julio ĝis la 5a de aŭgusto, okazis la ICEM-Esperanto-renkonto en akceptema kaj agrabla medio. Kvankam varmegis, kvankam ĉeestis nur unu nefranclingva kamaradino, ni estis aktivaj kaj bone okupitaj :

- ĝenerala kunveno, E-kursoj, konversacioj, matene.
 - laborkunveno pri la komisionaj aferoj, ekskursoj, posttagmeze.
 - distraj vesperoj (lumbildoj, diskutoj, kantoj, teatraĵoj).
- Eĉ la 7 infanoj plene partoprenis al la diversaj aktivecoj. Ni ĉefe laboris por la eldonaĵo de ICEM : BT, en kiu baldaŭ aperos 2 paĝoj pri Esperanto.

Kaj ni antaŭvidis la laboron farotan por la venonta RIDEF en Leuven (Belgio), kiu okazos en la dua duono de julio, 1984.

KTP - KTP ... jen la titolo de la gazeto de la renkonto, vera atestilo de ĝia sukceso, kiun ni sukcesis kooperative starigi! Por pliaj informoj, skribu al Henri MENARD, Le Pallet, F 44330 VALLET
Nicole D.

LA VENONTA LAŬTE APEROS KOMENCE DE NOVEMBRO

Majunulo rakontas :

NENIU ESTAS PROFETO EN SIA LANDO

Kiam mi estis juna, mi jam amis brikoli*, kiel multaj miaaĝaj knaboj.

En tiu epoko komenciĝis elsendoj de radioprogramoj en mia tiama lando.

Oni uzis la elektran kurenton de baterioj tre malfacile prizorgeblaj, ĉar ne ekzistis alia maniero funkcigi radion. Tiam, la elektra kurent-sistemo "kontinua" estis la sola distribu-sistemo de kurento, tre facile uzebla por la elektra "nutraĵo" de tiutempaj radio-aparatoj.

Vidante tion ĉe mi, iu elektristo min invitis iri kun li al estro de la fabriko de elektra kurento, por ricevi permeson uzi tian aparaton kaj ĝin produkti, ĉar en tiu tempo ĉiu uzado de elektra aparato devis esti "aprobata" de ĉi tiu estro.

Li, kaj nur li, povis permesi tion.

Poste, la elektristo kaj mi disiris, ĉiu al sia laboro, sed ni ambaŭ - ĉiu por si mem - aŭskultis tian radioaparaton sen permeso de la estro.

Okazis, ke mi trovis laboron en alia lando - malproksima - ĉar proleto ne havas patruon.

Mi rakontis tiun eventon al mia nova alilanda estro, kiu tuj min devigis - haltigante ĉiun alian laboron - fari unu tian aparaton, kion mi facile sukcesis.

De tiu tago mi tuj fariĝis subestro kun pli bonaj salajroj kaj situacio, kio ŝanĝis mian venontan vivon... eĉ mian patruon, kaj ebligis al mi plibonigi mian fakan scion en mia profesio, kaj mem "gravi" en mia fako.

Kiam, post kvin jaroj, mi retrairis, feriante, la landon de miaj avoj, tie oni uzis radioaparatojn **importitajn** de mia nuna nova "patrio"...

* brikoli : amatore labori.

-nn-

El la "Laŭtejo" :

* La **Adresaro** aperinta en L! de julio entenas kelkajn eraretojn kaj mankojn. Pardonpetas la fuŝinto ! Jam alvenis kelkaj novaj adresoj kaj modifoj. Ĉio estos reĝustigita kaj kompletigita en Suplemento, kiu aperos en 1984. Tial nepre konservu la ĉi-jaran **Adresaron** : ĝi utilos ankaŭ venontan jaron.

* La eldonanto pardonpetas ankaŭ pro tiu ĉi septembra n-ro : la tajpado per Julia ankoraŭ ne estas tre lerta, la papero estas iom tro travidebla, la ofsetado ne perfektas... Espereble, ĉio pliboniĝos, aŭ oni maldungu la fuŝulon !

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 LAROQUE. CPPAP n° 58651